

LASU AMBAŬ KUNE KRESKI ĜIS LA RIKOLTO

Komento al la evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 13, 24-43

En tiu tempo Jesuo proponis al la homamaso ĉi tiun parabolon: „La regno de la ĉielo similas al bona semo, kiun iu dissemis en sia kampo. Sed nokte, dum ĉiuj dormis, iu malamiko de la estro venis, semis malbonan herbon meze de la tritiko, kaj foriris. Kiam la tritiko kreskis kaj aperis ĝiaj spikoj, aperis ankaŭ la herbaĉo. Tiam la servistoj diris al la domomastro: ‚Sinjoro, ĉu vi ne semis bonan semon en via kampo? De kie venis do la herbaĉo?‘ Li respondis: ‚Iu malamiko faris tion.‘ Diris al li la servistoj: ‚Ĉu vi volas, ke ni iru ŝiri ĝin?‘ Sed la estro respondis: ‚Ne, por ke, elŝirante la malbonan herbon, vi hazarde ne elradikigu ankaŭ la tritikon. Lasu ke ambaŭ kune kresku ĝis la tago de la rikolto. Tiam mi diros al la rikoltistoj: Kolektu unue la malbonan herbon kaj ligu ĝin laŭ faskoj por bruligi ĝin; sed la tritikon kolektu en mian grenejon.‘”

Alian parabolon Jesuo proponis al ili: „La regno de la ĉielo similas al sinapa semero, kiun iu prenis kaj semis en sia kampo. Ĝi estas la plej malgranda el ĉiuj semoj, sed kreskinte, ĝi fariĝas pli granda ol la aliaj legomoj, kaj fariĝas arbo, tiel ke la birdoj de la ĉielo nestas inter ĝiaj branĉoj.”

Alian parabolon Jesuo diris al ili: „La regno de la ĉielo similas al iom da fermentaĵo, kiun virino prenis kaj miksis kun granda kvanto da faruno; kaj iumomente ĉi tiu estis entute fermentita.”

Ĉion ĉi tion Jesuo rakontis al la popolo per paraboloj, kaj sen paraboloj Li ne parolis al ili. Tiel efektiviĝis tio, kion diris la profeto:

*„Mi parolos al ili per paraboloj,
Mi rivelos aferojn kaŝitajn ekde la komenco de la mondo.”*

Poste Jesuo forlasis la homamason kaj eniris en la domon. Tiam liaj disĉiploj alproksimiĝis al Li kaj diris: „Klarigu al ni la parabolon pri la malbona herbo kreskinta en la kampo.” Jesuo respondis: „Tiu, kiu semas la bonan semon, estas la Filo de la homo; la kampo estas la mondo; la bonaj semoj estas tiuj, kiuj apartenas al la dia regno; la malbona herbo reprezentas tiujn, kiuj apartenas al la diablo. La malamiko, kiu semis ĝin, estas la diablo mem. La tago de la rikolto estas la fino de la mondo, kaj la rikoltistoj estas la anĝeloj. Kiel do la

malbona herbo estas kolektata kaj bruligata per fajro, tiel estos je la fino de la mondo. La Filo de la homo sendos siajn anĝelojn, kaj ili kolektos el lia regno ĉiujn faligilojn kaj ĉiujn, kiuj faras maljustecon, kaj ĵetos ilin en la fajran fornnon. Tie estos plorado kaj grincado de dentoj. Tiam la justuloj brilos kiel suno en la regno de sia Patro. Kiu havas orelojn, klopodu kompreni!

En la evangelio de Mateo ne nur ĉeestas la tentoj kiujn Jesuo trasuferis, sed ankaŭ estas elmontritaj la eblaj tentoj de la komunumo de la kredantoj en ĉiu tempo. En la 13-a ĉapitro, ni trovas tri parabolojn, kun la respondo al tri eblaj tentoj: ili estas la paraboloj de la Regno de la ĉieloj, kiujn Jesuo prezentas al siaj disĉiploj: mi memorigas, ke la esprimo "Regno de la ĉieloj" tipa de Mateo, indikas la Regnon de Dio, nome la alternativan socion, kie, anstataŭ amasigi por si, oni malavare kundividu kun la aliaj, kie, anstataŭ regi, oni servu, kaj kie, anstataŭ supreniri, oni malsupreniru. Jen, kio estas la Regno de la ĉieloj.

La unua tento, al kiu estas elmetita la ĉiutempa komunumo, estas la tento esti komunumo el elektitoj, komunumo el superaj homoj, kiu do strebas elimini la aliajn. Al ĉi tiu tento Jesuo respondas per la parabolo pri la semanto kaj la malbona herbo. Diras Jesuo, ke "*dum ĉiuj dormis, iu malamiko de la estro*", la malamiko de la Sinjoro, "*venis, semis malbonan herbon* (laŭvorte: lolon, kiu estas toksa, droga herbo) *meze de la tritiko, kaj foriris*". Sed pli damaĝa ol lolo, ol la malbona herbo, estas la servistoj, la fervoregaj servistoj. Fakte, "*Tiam la servistoj diris al la domomastro: "Sinjoro, ĉu vi ne semis bonan semon en via kampo? De kie venis do la herbaĉo?"*", kaj ili proponas: "*Ĉu vi volas, ke ni iru ŝiri ĝin?*". En la parabolo la mastro de la kampo malpermesas tion, li diras: "*Ne, por ke, elŝirante la malbonan herbon, vi hazarde ne elradikigu ankaŭ la tritikon*". La faro de la fervoregaj servistoj estas pli danĝera ol la malbona herbo. Do Jesuo diras ne al komunumo el nuraj elektitoj, ĉi tiu estas la tento kiun ofte travivas la ekleziaj grupoj, en kiuj ĉiu opinias posedi la ununuran respondon al la vivmaniero laŭ la mesaĝo de Jesuo, kaj pro tio ili malaprezas aŭ kondiĉas la vivon de la aliaj. Jesuo ne samopinias pri tio, do ne al la tento esti komunumo el nuraj elektitoj.

La dua tento, kiun la komunumo trasuferas - tion ni vidas laŭlonge de la tuta evangelio - estas tiu de la manio je grandeco; tiam, "*Alian parabolon Jesuo proponis al ili: „La regno de la ĉielo”*" Por kompreni ĉi tiun parabolon oni devas referenci la profeton Jezekiel. En la 17-a ĉapitro de Jezekiel, la estonta Regno estas imagita kiel cedro - kiu, kiel sciante, estas nomata la reĝo de la arboj - lokita sur alta monto. Do io eksterordinara, io kio tuj altiras la vidon kaj la admiron pro sia brilego. Jesuo diras tute alion: "*similas al sinapa semero, kiun iu prenis kaj semis*", estas kurioze, ke Jesuo parolas pri semado, ĉar sinapo ne estas semata, "*en sia kampo*". Komentas Jesuo: "*Ĝi estas la plej malgranda el ĉiuj semoj*", sinapo estas trudherbo; ĝiaj semoj, kiuj estas malgrandegaj, per la vento alvenas ĉien, pro tio ĝi ne estas semata, sed ĝi estas timata de la palestinaj kamparanoj. Do ĝi estas malgranda, sed ĝi alvenas ĉien: jen la mesaĝo de Jesuo: "*Ĝi estas la plej malgranda el ĉiuj*

semoj, sed kreskinte, ĝi fariĝas pli granda ol la aliaj legomoj", kaj jen la surprizo de Jesuo, "legomoj", kion volas diri Jesuo? Ke la Regno de la ĉieloj, tio estas la Regno de Dio, eĉ en la momento de plej granda brilego, ne altiros la atenton; sinapujo estas arbusto kiu, en favoraj zonoj, ekzemple la lago de Galileo, atingas du aŭ tri metrojn, sed ĝi estas ordinara kreskaĵo, kiu neniel altiras la atenton. Nu laŭ Jesuo la Regno de Dio, en la momento de plej granda disvolviĝo, ne altiros la atenton pro sia grandeco, pro sia mirindeco, sed kiel trudherbo ĝi alvenos ĉien.

La tria kaj lasta tento estas tiu de senkuraĝiĝo. La kristana komunumo estas malgranda, la farota laboro estas granda, kaj ekzistas la risko senkuraĝiĝi. Tiam Jesuo, pri ĉi tiu tento, diras alian parabolon: "*La regno de la ĉielo similas al iom da fermentaĵo, kiun virino prenis kaj miksis kun granda kvanto da faruno*", laŭvorte "tri mezuroj da faruno", multege por ordinara domo. Kial ĉi tiu mencio de tri mezuroj? Ĉar en la Malnova Testamento, ĉi tiu mezurkvanto aperas en rilato kun la epizodoj de Abrahamo kaj Sara, de Gideon kaj de Ĥana, la patrino de profeto Samuĉelo, ĉiam okaze de la plenumo de la promesoj de Dio al la popolo, eĉ en cirkonstancoj kiuj ŝajnis neeblaj. Tiam li diras: "*kaj iumomente ĉi tiu estis entute fermentita*"; la kristana komunumo ne devas ektimi antaŭ la enorma grandeco de la laboro, sed ĝi devas miksiĝi kun la ekzistanta realo por poste transformi ĝin, kaj Jesuo certigas tion. Nu, el la tri paraboloj, la ununura pri kiu la disĉiploj postulas klarigon, eĉ en ordona maniero, estas ĝuste tiu ununura, kiun ili eble komprenis, sed pri kiu ili ne samopinias. Fakte, "*liaj disĉiploj alproksimiĝis al Li kaj diris: «Klarigu al ni»*", la verbo estas en imperativa formo, temas pri ordono, "*la parabolon pri la malbona herbo kreskinta en la kampo*". Do ĉi tiu parabolo, en kiu Jesuo malkonfirmas la tenton esti komunumo el elektitoj, komunumo el homoj superaj al la aliaj, ĉi tiu ne estas akceptata de la komunumo de la disĉiploj. Nu, Jesuo klarigas, en la restanta parto de la parabolo, ke la unuopuloj juĝas sin mem, elektante, kio ili estu: aŭ tritiko, pano kiu nutras, beno por la aliaj, aŭ lolo, malbona herbo kiu venenas kaj mortigas. Do tri tento al kiuj la ĉiutempaj komunumoj povas esti elmetitaj, sed kun la certeco, kun la certigo, ke la mesaĝo de Jesuo efektiviĝos malgraŭ ĉio, malgraŭ la malriĉo de la rimedoj.